



“LA LITERATURO ESTIS MIA VOJAĜO INTERNEN POR SCII, KIU MI ESTAS”

Haitham Hussein. Verkisto

La kurda verkisto parolis pri la kundividitaj identecoj, la rilatoj inter lingvoj, la verkado kaj la konsekvencoj de la konflikto en Mezoriento.

Verkaron maturan kaj solidan havas la verkisto Haitham Hussein (Amudo⁽¹⁾, Roĵavo. 1978). En sia nova verko “Fiherbo en la paradizo” li rakontas pri la kurdoj, kiuj devis forlasi siajn vilaĝojn kaj urbojn. Tiom el ili forfuĝis en la malriĉajn kvartalojn de Damasko, post kiam la ribelo de Kamjŝlo⁽²⁾ estis subpremita en 2004.

Kia estis Roĵavo, kiam vi estis infano kaj junulo?

Ĉar ni estis kurdoj el Sirio kaj pli ĝuste el Amudo, nia ĉiutaga vivo estis plena je sufero, limoj kaj cenzuro. Ni ne povis libere fari ion ajn. Ni vivis kaptitaj en granda prizono. La siria reĝimo strebadis komprenigi al la kurdoj, ke ili estas fremduloj eĉ en ilia teritorio mem, kaj ĝi procesis kontraŭ io ajn, kion ni faris. La reĝimo konsideris krimon eldoni libron en la kurda lingvo. La siriaj aŭtoritatoj laboradis por forviŝi la kurdan identecon. La siriaj sekretaj servoj klopodis fari el ni skizofreniularon, distancigante nin el nia esenco.

Ĉu esti kurda verkisto alportis problemojn al vi?

Ĝuste tiel. La sorto volis, ke la literaturo alportu al mi subpremadon kaj multajn problemojn. Ĉiam, kiam mi eldonis libron, oni pridemandis min. Ili volis, ke mi forlasu la verkadon kaj min dediĉu al la instruado, sed estis nenio interesa nek sekura en la vivmaniero, kiun ili aludis al mi. Do, la literaturo estis mia aventuro, mia vojaĝo internen, por vere scii, kiu mi estas.

Kaj sub tia kontrolo kaj cenzuro, ĉu via verkaro povis disvastiĝi?

Oni ĉiam cenzuris krude mian laboron, tiel la romanojn, kiel la artikolojn. Ĉiam, kiam mi estis intervjuita, oni procesis kontraŭ mi kaj oni pridemandis min pri kion mi volis diri, jen en tiu ĉi frazo, jen en tiu alia. Krome, miaj libroj iugrade estis malpermesitaj en mia lando. Kelkaj estis akireblaj en Damasko, ĉar la reĝimo opiniis, ke la ĉefurbaj kurdoj estis asimiligitaj, sed ili ne estis atingeblaj en mia naskiĝurbo, nek en la cetera Kurdio. Pere de amikoj mi disvastigis ilin.



Kiun lokon vi donas al la memoro en viaj verkaĵoj?

Surbaze de la heredaĵo de miaj memoroj disvolviĝas mia skribado: la infaneco; la socio, en kiu mi kreskis; la komunumoj, kiuj vivis en tiu socio, de kiu mi estas parto. Multaj detaloj venas al mi el la memoraĵoj pri mia naskiĝloko kaj la urboj, en kiuj mi vivis dum jaroj. Freŝan memoraĵon mi havas pri ĉiu el tiuj urboj; la detaloj de la ĉiutaga vivo mergas miajn rakontojn, kaj la spegulaĵo de tiuj estas miaj roluloj.

Kiel vi plektas viajn rilatojn inter la kurda kaj la araba lingvoj?

La kurda estas mia gepatra lingvo, kaj kun ĝi kaj per ĝi mi vivas; kurde mi parolas kun la filinoj, la edzino, la familio. Sed la araba estas mia “gepatra lingvo” rilate verkadon. La kurdan mi ne lernis instruite, sed ĝi estas mia lingvo kaj sen ĝi mi ne povas vivi.

La startpunkto de via lasta romano estas la kurda ribelo de Kamjŝlo de 2004.

Mi provis elekti parton de la moderna historio de la kurdoj de Sirio, komencante je la fino de la franca koloniigado kaj la naskiĝo de tiu ĉi lando. La ribelo de Kamjŝlo estis grava okazaĵo, decidiga rilate la kunvivadon inter kurdoj kaj araboj en la kurda regiono. La siria reĝimo malbonege kondukis, ĉar ĝi detruis la rilatojn inter ambaŭ komunumoj kunfrontigante ilin, kaj montris, ke la hejma despoto ne pli bonas ol la fremda koloniisto. Por la kurdoj, finfine, ambaŭ estas koloniistoj; tempas rompi tiujn koloniismajn katenojn.

La ĉefrolanto estas ino. Kiel ŝanĝis la rolo kaj la bildo de la virinoj dum la militotempo?

Jes ja, mi ĉefroligis virinon, ĉar mi volis reakiri, kiel la inoj tenis sian voĉon kaj esprimivon dum jaroj kaj jaroj, ene de subprema kaj perforta etoso. Ankaŭ la ĉefrolanto de mia dua romano (*La forkaptitaĵoj de la memoro*) estas ino.

Mi opinias, ke estas ia perturbo, kiam en Okcidento oni imagas la kurdan virinon. Al mi ŝajnas, ke oni prioritatas la bildon de la partizaninoj batalantaj kontraŭ la Islama Ŝtato je la unua linio, sed tio estas bildo por leĝera kaj pasema konsumo. Mia opinio, tiu bildo ne helpas la inon en ties liberigado, kaj ĝi ne signifas, ke la kurda ino ja estas libera.

Kiun sperton vi havis en la milito?

En kampara regiono proksime de Damasko mi vivis en mia domo, kaj la tutan zonon ono bombadis; mi devis forfuĝi meze de 2012. Estis tre peniga epoko, terura, ĉar la bataloj estis ĉiutagaj. Ni esperis, ke la milito ne daŭros longe kaj ke la internacia komunumo ne akceptos tion, kio estis okazanta, tiun evidentan masakron, sed la afero estas, ke la sirianoj devis alfronti la morton sub la rigardado de la mondo, kvazaŭ temus pri realeca televidserio.

Ĉu tiuj proksimaj spertoj estis inspiro por verki iun rakonton?

Mi ne povis skribi romanon pri la milito; do, mi decidis fari esploron, eseon pri la milita literaturo “La romanverkisto sonoradas per milit-tamburoj”. Mi klopodis kolekti la militajn tragediojn el la verkoj de okcidentaj kaj orientaj aŭtoroj, portretitajn en membiografioj kaj memoraĵoj.



En tiu ĉi mondo, kiu ŝajne senĉese estas en profunda indenteckrizo, kio estas por vi la identeco?

Tiu afero ĉiam ĉeestas. Mi strebas ĝin disvolvi kaj montri miajn vidpunktojn. Multaj suferas indenteckrizon ĉirkaŭ ilia realeco. Ili ne elpensas, kiel amikigi la multajn kolorojn, kiuj kompletigas ilian homidentecon. Mi pensas, ke danke al la diferencoj ni havas pli proksime konvenan modelon pri la identeco. Por mi, la identeco kaj la homo estas la sama afero. Mi mem, ekzemple, estas la miksaĵo de kelkaj integriĝintaj identecoj: naskiĝe mi estas kurdo vivinta en araba lando. Bone mi parolas kaj la kurdan kaj la araban. Miaj gepatroj muzulmanas, sed mia laŭpatra avo estis armeno kaj la laŭpatrina estis arabo. Nun mi vivas en Britio, kaj miaj filinoj estas kreskantaj en la kurda kaj la angla; do, en mi estas pli ol unu identeco. Estas nenio konsiderinda “identece pura”, sed ekzistas homa integra identeco, kaj tio estas sanktega.

Kion povas fari la kulturo por solvi konfliktojn?

Mi opinias, ke ĝi povas havi flankan influon, sed tiu influo estos tre grava estontece. La kulturo helpas por ke pli kaj pli da personoj konsciuj, ke la homo senĉese elektadas. La kulturo donas al ni spacon, kie ĉio kundividiĝas kun ĉiuj, kaj por agnoski la aliajn tiajn, kiaj ili estas. La kulturo montras al ni la mondon pli amplekse, ol rasisto aŭ fanatikulo ĝin imagas. La intelektuloj, ĝuste, estas la stimulantoj de revata civila vivado, la stimulantoj de civila vivo for de la absurdeco kaj la militkrimoj.

Ĉu vi sentas vin parto de generacio de verkistoj kurdaj kaj arabaj?

Mi sentas, ke mi estas parto de pli ol unu generacio. Mi sentas, ke mi estas el la generacio de kurdaj verkistoj, kiuj verkas arabe, kiuj verkas pri sia kurdeco, pri la kurdaj socio kaj realeco, ene de la plurala siria socio.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Amûdê.
- (2) Qamîshlo.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: J.M. Arrugaeta kaj Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berrria la 12-an de Novembro 2017-a.

Tradukis: NXC. Marto 2018-a. Provlegis: DS.

